

Ami kaj Karlo en Pekino

艾米与卡罗在北京

郝璟琳 著



中国国际广播出版社

Ami Kaj Karlo en Pekino

艾米与卡罗在北京

作者：褚璟琳

审稿人：赵建平、谢玉明

图书在版编目 (CIP) 数据

艾米与卡罗在北京 / 褚璟琳著. —北京: 中国国际广播出版社, 2010.3

ISBN 978-7-5078-2379-0

I. 艾… II. 褚… III. 世界语—自学参考资料
IV. H823

中国版本图书馆CIP数据核字 (2008) 第213209号

艾米与卡罗在北京

著 者	褚璟琳
责任编辑	郑凤杰
版式设计	国广设计室
责任校对	徐秀英
出版发行	中国国际广播出版社 (83139469 83139489[传真])
社 址	北京复兴门外大街2号 (国家广电总局内)
	邮编: 100866
网 址	www.chirp.com.cn
经 销	新华书店
印 刷	海军政治部印刷厂

开 本	850×1168 1/32
字 数	110千字
印 张	3.75
版 次	2010年3月 北京第一版
印 次	2010年3月 第一次印刷
书 号	ISBN 978-7-5078-2379-0/H·314
定 价	20.00元

国际广播版图书 版权所有 盗版必究

(如果发现印装质量问题, 本社负责调换)

Enkonduko

Zhao Jianping

En la jaro 1985, ellerninte Esperanton en universitato, mi venis al Ĉina Radio Internacia (tiam Radio Pekino) por labori en la internacia lingvo kiel parolisto, reportero kaj tradukisto. Post kelkaj monatoj mi jam tralegis la cervantan romanon «La Inĝenia Hidalgo Don Kiĥoto de Manĉo», majstre tradukitan de Fernando de Diego sub la titolo “La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha”, kaj suĉis multe da suko. Sekve mi entreprenis tradukadon de ĉina klasika romano. Pli poste mi provis verkadon en Esperanto, tamen al mi neniam venis en la kapon la ideo verki ion pri lernado de la ĉina lingvo por alilandaj samideanoj, nek pri amikeco meze de diversanaciaj esperantistoj.

En la lastaj pli ol dek jaroj aperis versioj por instrui la ĉinan lingvon. Sed iom seke kaj formale, ĉu ne?

Feliĉe, ke mense akusiĝis knabeto dolĉa, bela kaj mirinda, kun la imagiga nomo “Ami kaj Karlo”. Efektive, “akusiĝis”, ĉar la verkinto estas ĉarma junulino, naskita en 1980 kaj veninta al ĈRI en 2002.

Jen Ma Jinglin (玛璟琳, Mirinda Esperante) - la nomo en la internacia lingvo neniom trompas. Post monata gravedado ŝi akuŝis por ni la nuna libro. Libro dolĉa. La dolĉeco gustas el tio, ke aŭskultante aŭ legante la tutan tekston oni kvazaŭ trafus nektaron, tiel ke tia flormielo flugas de tempo al tempo tra la buŝo en miela monato de Ami kaj Karlo. Oni sentas nur

intimon, dolĉon, teneron, plezuron kaj agrablon.

Kaj la beleco? Belas la amikeco inter la tri geesperantistoj ĉina, franca kaj korea, kiel miniaturo de tiu de la 3-landaj popoloj, manifestata ankaŭ en metroo, supermarkto, taksio, hotelo, tiom pli en la universitato, vizitata de Ami, meze de sangvinaj studentoj el diversaj landoj; belas amo inter la orientanine pudorema, delikata kaj ĉarma Ami kaj la ĝentlemana, helpema kaj humura Karlo; belas la Birda Nesto kaj Akva Kubo, olimpikaj simboloj de Pekino—kaj ĉiom da belaĵoj reliefiĝas el la bela kaj lakona lingvaĵo de la juna aŭtorino Mirinda.

Efektive, tre mirinde, ke Mirinda oficiale lernis Esperanton nur post sia veno al nia redakcio, instruate de veterano Liu Junfang, kvankam ŝi, kiel studentino de hispanlingva specialeco en Pekina Lingva kaj Kultura Universitato, jam tuŝis la internacian lingvon dank’ al sinjoro Li Weilun en unu jaro.

Sen diligento kaj talento oni neniel povus atingi la nivelon levitan en ĉi tiu libro. Mi elkore rekomendas la libron pro tio, ke ĝi estas vere leginda kaj ĝuinda.

Enhavo

Ĉapitro 1

Renkontiĝi en flughaveno / 机场相遇 2

Ĉapitro 2

Preni aŭtobuson / 乘坐汽车 8

Ĉapitro 3

Enhoteliĝi / 入住酒店 16

Ĉapitro 4

Serĉi perdaĵon / 失物招领 23

Ĉapitro 5

Volontuli / 志愿者 29

Ĉapitro 6

Telefoni / 通电话 35

Ĉapitro 7

Fari aĉetadon en supermarkto / 超市购物 42

Ĉapitro 8

Gasti en pekinana hejmo / 作客北京人家 51

Enhavo

Ĉapitro 9

Viziti vidindaĵon / 游览景点 59

Ĉapitro 10

Konsulti kuraciston / 医院看病 68

Ĉapitro 11

Elekti donaĉon / 选购礼物 76

Ĉapitro 12

Spekti konkurson / 观看比赛 83

Ĉapitro 13

Bankedi en restoracio / 餐厅聚会 89

Ĉapitro 14

Viziti olimpikajn konkursejojn / 参观奥运场馆 95

Ĉapitro 15

Disiĝi / 分别 100



Ĉapitro 1

Sekve de surterigo de la aviadilo, nia ĉefa rolo, 26-jaraĝa franca fotografisto Karlo kun bruna hararo kaj bluaj okuloj el Parizo atingis Pekinan Ĉefurban Internacian Flughavenon. De tiam komenciĝis lia dua vojaĝo en Pekino.

En 2004, li kaj iuj aliaj francaj esperantistoj kune partoprenis en la 89-a UK en Pekino, tio estis lia unua vizito al Ĉinio. Tiam la Granda Muro, la Imperiestra Palaco kaj pekina karakteriza strateto Hutong donis profundan impreson al tiu franca fotografisto. Reveninte al Francio, Karlo planis refoje viziti Pekinon kaj foti serion da fotoj kun ĉina ĉarmo. Hazarde en la komenco de la kuranta jaro, la turisma eldonejo de Karlo deziris eldoni fotolibron, por montri ĉinan tradician kulturon kaj homan ĉarmon de Pekino kiel olimpika urbo. Post akcepto de la tasko, Karlo tuj kontaktiĝis kun sia pekina amiko, esperantisto Li Chao. Irante al la enlandiĝa dogana kontrolejo, Karlo serĉis kontaktan manieron pri hotelo en la sako. Tamen li tute ne sciis, ke lia pasporto falis el la sako.

Karlo atingis la enlandiĝan doganan kontrolejon, doganistino ridete diris al li:

Doganistino: 您好, 请出示您的护照。

Nín hǎo, qǐng chū shì nín de hù zhào.

(Saluton, bonvolu montri vian pasporton.)

Karlo: 您好!

Nín hǎo!

(Saluton!)

Karlo memoris iujn esprimojn instruitajn de Li Chao surrete. La konversacio ankoraŭ restis en lia memoro.

Li Chao: “您好nín hǎo” signifas “Saluton”. “您nín” estas vi kaj “好hǎo” estas bona.

Karlo: Nín hǎo.

Li Chao: Ĝuste! Vi nepre devas memori ĝin.

Karlo: Ho, certe.

Do Karlo respondis en fremda ĉina lingvo kaj samtempe serĉis la pasporton en la sako. Tamen kial perdiĝis la pasporto? Vidante longan vicon post si, Karlo tre maltrankvilis. Ĝuste en tiu momento, iu preskaŭ 20-jara azia

您好
nín hǎo

谢谢
xiè xie

Dankon

Saluton



knabino donis pasporton al Karlo kaj demandis per mallerta angla lingvo. Karlo trovis, ke tiu ĝuste estas lia pasporto.

La knabino nomiĝas Ami kaj venas el Korea Respubliko. Antaŭ ol veni al Pekino, ŝi jam lernis la ĉinan lingvon unu jaron. Ĉi-foje ŝi venas al Pekino por daŭrigi lernadon de la ĉina lingvo en Pekina Lingva kaj Kultura Universitato. Kvankam ŝi jam estas 20-jaraĝa, tamen estas ankoraŭ la unua fojo por ŝi iri sola al tiel malproksima loko. En la deponejo, ŝi levis la pasporton de Karlo kaj do atendis en la enlandiĝa dogano, esperante trovi la mastron laŭ foto sur la pasporto. Vidante Karlon, ŝi tuj alkuris.

Tiam iu ĉina junulo kun okulvitroj vokis Karlon kaj kure proksimiĝis al ili. Li ĝuste estas ĉina amiko de Karlo, 28-jaraĝa Li Chao.

Li Chao: Hej, Karlo!

Karlo: Hej, saluton! Kiel vi fartas!

Li Chao: Bone. Kaj vi? Tre longa vojaĝo, ĉu ne?

Karlo: Bone. Mi tre ĝojas refoje viziti Pekinon.

Ami: Vi estas esperantistoj?

Aŭdinte ke ili parolas en Esperanto, Ami tuj sin intermetis en Esperanto. Fakte la patrino de Ami estas esperantistino. De la infaneco, Ami lernis Esperanton de sia patrino. Ami maltrankvilis pro sia neflua angla lingvo, aŭdinte ke tiuj du novaj amikoj scipovas Esperanton, ŝi tuj ekscitiĝis.

Karlo: Jes. Ankaŭ vi?

Ami: Jes, jes! Mi lernis Esperanton ekde la infaneco.

Karlo: Ho, bonege! Ho, mi eĉ forgesis fari konatigon por vi. Jen estas mia ĉina amiko Li Chao. Ŝi estas mia nova amiko Ami el Korea Respubliko. Ŝi ĵus helpis min.

Li Chao: Saluton, mi tre ĝojas koni vin!

Ami: Saluton.

认识你很高兴。

Rèn shì nǐ hěn gāo xìng.

(Mi tre ĝojas koni vin.)

Li Chao: Ho, vi scipovas la ĉinan lingvon?

Ami: Iomete, mi lernis iomete en Korea Respubliko.

Karlo: Hej, pri kio vi parolis? Mi scias nenion pri la ĉina lingvo.

Li Chao: Karlo, tiu frazo estas tre utila ankaŭ por vi. “认识你很高兴rèn shì nǐ hěn gāo xìng”, “Mi tre ĝojas koni vin”. “认识rèn shì” signifas “koni”, “你nǐ” signifas “vi”. “很hěn” signifas “tre”. “高兴gāo xìng” estas “kontenta, ĝoja”.

Karlo: 认识你很高兴, Ami!

Rèn shì nǐ hěn gāo xìng, Ami!

Ami: Karlo, 认识你很高兴。

Rèn shì nǐ hěn gāo xìng.

Ami kaj Karlo kune ridis. Karlo pensis, ke kvankam preskaŭ perdiĝis la pasporto, tamen estas fortune koni novan amikon kaj ankaŭ esperantistan amikon. Vidante signifoplenan ridon de tiuj du fremdaj amikoj, Li Chao sentis ion misteran.

Li Chao: Karlo, ĵus vi menciis, ke Ami helpis vin. Tamen vi ĵus renkontiĝis en la flughaveno, ĉu ne?

Karlo: Tute dank’ al la pasporto.

Li Chao: Pasporto?

Karlo, Ami: Jes.

Karlo ride rakontis pri la retrovita pasporto al Li Chao.

Li Chao: Vi nepre devas bone konservi la pasporton!

Karlo: Jes.

Li Chao: Ni diras “护照hù zhào” ĉine.

Karlo: Hùzhào. Mi ne forgesos.



Li Chao: Kaj vi ankaŭ devas diri “谢谢xiè xie” al Ami.

Karlo: 谢谢。Ami, 谢谢。

Xiè xie. Ami, xiè xie.

Ami: 不客气。

Bú kè qi.

Ne dankinde.

Li Chao: Bone! Nun ni kune foriru.

Tiuj tri esperantistoj foriris el la flughaveno. Kien ili iros? Kio okazos poste al Karlo kaj Ami?

Vortaro

护照	[hù zhào]	pasporto
您好	[nín hǎo]	saluton
谢谢	[xiè xie]	dankon

Esprimoj

认识你很高兴	[rèn shi nǐ hěn gāo xìng]	Mi tre ĝojas koni vin.
不客气	[bú kè qi]	Ne dankinde.

Etendita vortaro

机场	[jī chǎng]	flughaveno
行李	[xíng lǐ]	pakaĵo
行李提领	[xíng lǐ tí lǐng]	deponejo de pakaĵoj
候机室	[hòu jī shì]	atendejo
入境	[rù jìng]	enlandigi
外币兑换	[wài bì duì huàn]	monintersanĝo
登机口	[dēng jī kǒu]	enaviadiliĝa pordo

Noto

La nove konstruita flughalo n.3 de Pekina Ĉefurba Internacia Flughaveno estas la plej granda flughalo en la mondo. La totala areo proksimiĝas al miliono da kvadrataj metroj. Post ĉiufanka funkciado de la flughalo n.3 la kapablo de la ĉefurba aerodromo akcepti vojaĝantojn altiĝas de 36 milionoj da homfojoj ĉiujare ĝis 76 milionoj. Novaj kurejoj servas por altnivelaj aviadiloj, ekzemple Aerbuso 380 kaj aliaj novaj grandtipaj aviadiloj.

Ĉapitro 2

Portante pakaĵojn Karlo, Ami kaj Li Chao eliris el la halo de flughaveno. Li Chao donis al Karlo iun karton kun hotelaj informoj. Li anticipe mendis hotelon por Karlo.

Karlo: Ho, koran dankon pro via varma helpo! Do kiel mi atingu la hotelon?

Li Chao: Ne dankinde! Nun ni iru al la hotelo per flughavena aŭtobuso. Via hotelo estas iom malproksima de la flughaveno. Do poste ni prenu taksion. Ho, kaj vi, Ami, kien vi iros?

Ami: Mi iros al la universitato. Jen estas la adreso.

Dirinte tion Ami elprenis kajeron el sia sako kaj donis ĝin al Li Chao. Rigardinte la kajeron Li Chao diris ridete:

Li Chao: Ho, Pekina Lingva kaj Kultura Universitato! Mi diplomigis ĝuste el ĝi. Do estas tre facile. Prenu la flughavenan aŭtobuson kune kun ni kaj poste, veturu per metroo.

Ami: Koran dankon! Mi ja pensas pri tio. Nun, ni aĉetu biletojn.

Karlo, Li Chao: Bone!

Pri la vojaĝo por lernado Ami estas kaj ekscitita kaj maltrankvila. Pripensante la solan vivon en fremda lando Ami maltrankvilas pri la lingva problemo. Ŝi scipovas diri nur kelkajn ĉinlingvajn frazojn kaj ne bone parolas la anglan lingvon. Ŝi neniam atendis, ke ŝi renkontiĝos kun esperantistoj Karlo kaj lia amiko. Pli kaj pli malaperis la maltrankvilo de Ami. La 3 homoj kune iris al biletoĝiĉeto de flughavena

aŭtobuso.

Li Chao: 您好，我要买三张票！

Nín hǎo, wǒ yào mǎi sān zhāng piào!

(Saluton, mi aĉetu tri biletojn!)

Biletvendo: 您要几张？到哪儿？

Nín yào jǐ zhāng? Dào nǎ er?

(Kiom da? Al kie?)

Li Chao: 三张，到西单。

Sān zhāng, dào Xī dān.

(Tri. Al Xidan.)

Karlo: Ami, ĉu vi komprenas esprimon pri aĉeto de bileto?

Ami: Ne, mi ankoraŭ ne lernis.

Li Chao: Vi ambaŭ devas memori ĝin, estas tre utile por vi! Mi

aĉetu bileton ĉie estas “我要买一张票 wǒ yào mǎi yì zhāng piào”.

“我 wǒ” signifas “mi”, “买 mǎi” signifas “aĉeti” kaj “票 piào” estas “bileto”. “一张 yì zhāng” ĉi tie estas “unu”.

Karlo: 我要买一张票。

Wǒ yào mǎi yì zhāng piào.



(Mi volas aĉeti bileton.)

Ami: Ankaŭ mi. Vi ĵus menciis Xidan, mi ŝajne iam legis tiun lokon en libro pri turismo en Pekino.

Li Chao: Xidan estas unu el la plej prosperaj komercaj stratoj de Pekino. Poste vi povos viziti ĝin por aĉetado.

Karlo: Bone, tre bone! Kiom mi devas pagi? Tamen mi ankoraŭ ne havas Renminbi.

Ami: Mi jam konvertis monon en Korea Respubliko. Jen la mono.

Li Chao: Ne grave. Mi preskaŭ forgesis, ke vi povas interŝangi monon en la flughaveno aŭ hotelo. Ĉi-foje mi pagu, kaj nun ni enbusiĝu!

Karlo, Ami: Dankon!

Dirinte dankon Karlo transprenis la pakaĵon de Ami kaj metis ĝin en aŭtobusan konservejon. Ami ridete diris:

Ami: 谢谢!

Xiè xie!

(Dankon!)

Karlo: Ne dankinde!

Li Chao: Hej, Karlo, ĉu vi forgesis? Vi devas respondi: “不客气 bú kè qì”.

Karlo: Ho, jes! 不客气。

Bú kè qì.

(Ne dankinde.)

La tri homoj ridis unu al alia. Ami pensis, ke la amiko estas tre ĝentila.

Ascendinte en la aŭtobuson, la 3 homoj ĝoje babilis. Post nelonge la aŭtobuso atingis la stacion.

Karlo: Ami, mi helpu vin!

Vidinte, ke Ami volas preni la pakaĵon, Karlo tuj prenis